Zone euro : 3,50 €, autre pays : 4,50 €
www.sat-amikaro.org


La SAGO
La SAT-Amikara GazetO
Mensuel

Numero 85 ☆ Espéranto : vers une culture sociale sans frontière ☆ Junio 2012

# Unua de majo en Parizo




# Ni daŭrigu la lukton!





# Unua de majo en Parizo

La unuan de majo, je la 13a horo, malgranda SAT-Amikara skipo ariĝis en sia pariza sidejo, kaj animfirme marŝis (tamen per metroo) ĝis la bulvardo Henriko la 4a, apud Bastila Placo. Ni trafis nian elektitan busbudon « Cerisaie » (Ĉerizejo), kiun ni rezervis kaze de pluvo, kvankam ĝi neniam okazis. Dudek minutojn poste, bela ekspon-budo staris.

Krom la petskriba tablo, ĝin ornamis afiŝoj, glumarkoj, flago kaj bendego pri Esperanto, por ĝia uzo de la laborista klaso, per ago de SAT-Amikaro (nu, eventuale unue nur subskribante petskribon por apero de Esperanto en la franca abiturientekzameno). Netrude sed nur atendante ke homoj prenas la flugfoliojn, ni tamen finfine rapide disdonis 2 000 flugfoliojn, tiel ke je la 18a jam ne plu restis! Tamen ni atendis ĝis la 20a horo vendante la restantajn lernolibrojn, vortaretojn, insignojn, donante la glumarkojn, kaj vendante la libron pri la Indignuloj far ABC Eldono (disponebla en la Libroservo).

La afero ja ŝajnas sufiĉe sukcesa danke al okulfrapa situo de la budo, trafaj reklamiloj kaj entuziasma skipo!



Fotis Nikolao Rajmondo

*Legindaj legendoj*

# « Teniso Rolangarosa »

*Leginda legendo* invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj. Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, *Leginda legendo* povas interesi ĉiujn legantojn!

Mi gardas en la memoro bildon de rugbea matĉo televida. Ĝi montras densan, testudodorsan[1] amason da batalantoj brakenbrakaj[2]. Enormajn femurojn, striktajn ŝortojn sur ronda elmontro de masklaj postaĵoj, la spektantinoj rave admiras. Postrestaĵo de antikvaj bataloj.




Hodiaŭ, la nerondan ledvezikon[3] anstataŭas pomdika[4] pilketo gaje flave kolorita. Por eviti rektajn malpurajn kontaktojn, la du kontraŭuloj uzas rakedojn sed la baza principo same restas: senbalastigi[5] sin je la pilketo, kiun oni tute ne volas allasi en sian kampon. Oni plej forte ĵetas ĝin al la malamika flanko kaj la oponanta rakedo tuj provas resendi ĝin. Anstataŭ pezaj, krudaj puŝoj kaj amasaj intermiksaĵoj en vireca batalo, mi hodiaŭ spektas rafinite ruzajn, rapidajn sportistojn.

Nur du samtempe ludas por eviti ĥaoson. Ili sin alfrontas sed retbarilo malebligas brutalan, rektan kontakon. La rakedoj senkompate, kuglepafas[6] la pilketon. Por certigi sekurecon, por respektigi la regulon, ke iu ludanto ne transsaltu atake la barilon, kompanio da gvatistoj kaj unu reganto sur alta seĝo denuncas la plej malgravajn erarojn. Geknaboj plenumas la servolaboron.

La rolantinoj estas elegantaj, sveltaj. La kurtaj jupetoj flirtas supre de longaj gamboj, kiuj moviĝas rapide, tien, reen, kruce, denove, dum la brakoj svingas, turniĝas admirinde, akompanataj de elvokivaj ĝukrioj[7] : haaaa… La publiko silente gapas, preta hurai[8]. « Belega atingo de fraŭlino Frapipova! » Ŭaaa! Sub la ŝvebanta jupeto, kalsoneto sporade ekaperas dum la danĝera manarmilo[9] svingiĝas. Paf! Ĥaaaan…! Mirinda spektaklo. Pro seksegaleco aŭ manko de graciaj dungitinoj, kuras ankaŭ pli node masivaj kruroj ekipitaj de ĝisgenue[10] longaj ŝortoj. Tiuj ludoj okupantaj niajn ekranojn estas sufiĉe agrablaj. Almenaŭ, la ĉampionoj promesas nenion neatingeblan. Ili pensas al nur siaj gloroj kaj komfortaj salajroj. Ni, la fotelsportistoj[11] estas kontentaj.

KLOD

(1) kiel dorso de testudo (2) kun la brakoj en la brakoj (3) vezikoj el ledo (4) ne pli dika ol pomo (5) igi sen balasto, sen peza embaraso (6) pafi kvazaŭ per kuglo (7) certe, krioj pro ĝojo (8) krii : hura! (9) armilo uzata per mano (10) ĝis la genuoj (11) sportistoj en hejmaj foteloj.

# Vizitu la kulisojn de *La Sago*

Karaj legantoj, kiuj pro la titolo esperis malkovri sensaciaĵojn, far-sekretojn, k aliajn frandajn anekdotojn pri tio, kio okazas en la skipo de anoj, kiuj kunlaboras al preparo de la asocia revuo, vi povas jam transiri al alia revuero. Ja ĉi artikolo ne celas elmontri kiom mirinda mondeto funkcias en la ombro por provizi la ŝatatan (aŭ ne!) revuon, sed nur praktike ebligi al ĉiu interesiĝanto konkrete ekscii kiel la revuo estas ŝvite pretigata preskaŭ ĉiumonate 10 fojojn en la jaro. K tio kun la malkaŝa celo, ke pliaj kunlaborantoj emos proponiĝi por vivigi ĉi asocian ligilon, kiun konsistigas *La Sago*.

La propono redakti teĥnikan artikolon por montri la kielon de la skip-laboro por la gazeto estis farita de eksterskipa ano dum la Ĉatorus-kongresa laborgrupo pri *La Sago*. Ĉar ja ĵus sufiĉe draste ŝanĝiĝis la skipa organizo: lastatempe, precipe ŝanĝo de enpaĝiganto (Serĝon stafetis Deĉjo) k emeritiĝo de piliera redaktskipano (Andreo post fino de la rubriko Kiel traduki ankaŭ la korektadan laboron ĉesis). Nun la skipo adaptis sin al nova funkci-maniero, k alprenis novan labor-metodon k kunlaborilon (precipe ekuzante la liberkodan vikion « MediWiki », t.e. retejo el la speco de Vikipedio, kiu ebligas pluropon kunredakti artikolojn). Do nun estas tre bona momento por ke vi, hezitema leganto kiu eble ne aŭdacas proponiĝi aŭ ne scias kiel vi povus plej efike helpi, anonciĝi por kunlabori en nova skipo.

Jen skize, kiel okazas bakado de la revuo: (1) Kolektado de kontribuoj (ĉu spontane senditaj, ĉu provizitaj de skipanoj kiuj instigas konatojn verki, mem verkas, aŭ traserĉas materialon ĉerpeblan el la reto aŭ gazetaro); (2) Taksado de la skipo ĉu aperigi aŭ ne, k se jes (plej ofte!), korektado far skipanoj, rekte en la Vikio; (3) Kiam amasiĝis sufiĉe da materialo aŭ/k proksimiĝas la alpreseja sendodato, propono de kanvaso, t.e. ordigo de la artikoloj laŭvice en la revuo, konsiderante enhavon, longon, aspekton (kun aŭ sen bildo, kolora aŭ ne, elekto de frontpaĝo) ktp por kiel eble plej agrabligi la legado de la tuta numero; (4) Enpaĝigado de la tuta materialo; (5) Lasta provlegado de la enpaĝigita numero antaŭ finsendo de la lasta versio presejen.

Nenio tre mirinda en tio do. Aldonindas, ke ĉiuj skipanoj laŭeble intervenas en ĉiuj fazoj de la pretigo, per konsiloj, sugestoj, opiniesprimoj kiam ne rekte pri teĥnika flanko (ekzemple la enpaĝigadon faras nun kapablulo pri ĝi, sed ajna skipano povas indiki, kiun aspekton preferus). Skipanoj do estas plurtipaj, ofte ne unutaskaj (ja normalas, ke por *La Sago*, ĉiu skipano havu plurajn kordojn ĉe sia pafarko!), zorganto ĉu/k pri provizo de kontribuaĵoj (tekste, bilde, idee, kontakte, ...), taksado, korektado (ete aŭ ege, laŭeble k laŭeme), enpaĝigado (konkrete aŭ sugeste), finprovlego.

Do, kara leganto, kiu konstatis ke jena numero trafas vin malakurate k konscias ke tio okazas pro nuntempe nesufiĉe laborforta skipo, estus bonvena por aldoni vian ŝtoneton al la komuna strebo, ĉu simple sendante kontribuaĵojn, ĉu enirante la skipeton, por ekpafi kun ni *La Sagon* pli foren, trafe ĝis la celo!

Nome de la skipo,
la ĉefredaktanto, Markovo-Vito.

# *Enhavo*

**VIVO DE LA ASOCIO**

Unua de majo **p. 1-2**
Vizitu la kulisojn de La Sago **p. 3**
Perantoj **p. 5**
Muro de Federuloj 2012, blovo de espero **p. 8**
Fino de « Kiel Traduki » **p. 9**
Kiel daŭrigi « Kiel Traduki »? **p. 9-10**

**ANALIZOJ, OPINIOJ**

Mortpuno, abomeno kaj sovaĝeco **p. 4-5**
La verda kapitalismo **p. 6-7**
Lin' en Azio **p. 7**
Komento de Mirejo: « Kokakoloniado » **p. 8**

**HUMURAĴOJ**

Selle-humuraĵoj **p. 10**

**RECENZOJ**

La Profeto el Pedras, Gersi Alfredo Bays **p. 11**
Urboj por ŝanĝi la mondon, de André Cazetien **p. 11**

**PLU MOVIĜAS LA MOVADO**

Raporto pri la projekcio de filmo « Esperanto » **p. 12**
Ni semis, as, os **p. 12**
Vinilkosmo IL 34 **p. 13**
Ĉu restas espero pri la fimo « Esperanto »? **p. 14**
La campagne pour l'espéranto au bac avance ! **p. 14**
Kvinpetala somerprogramo **p. 15**
Internaciaj renkontiĝoj en Pluezeko **p. 15**
En Manosko **p. 16**
Esperanto-budo ĉe « Fête bio » (apud Angers) **p.16**

**LEGINDAJ LEGENDOJ**

Teniso Rolangarosa **p. 2**

**LA SAGO.** CPPAP n° 0312 G 86224.
ISSN: 1763–1319.
Directeur de la publication : Guy Cavalier.
Impr. TROISA, 91480 Quincy–sous–Sénart.
Dépot légal à parution.

*Ĉefredaktanto :* Vito Markovo. *Enpaĝiganto:* Andreo Hoaro kun helpo de Diana Riŝar. *Redakt- kaj korekt-skipo :* Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', kun helpo de: Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Jorgos, Ŝtonĉjo.

*Partoprenis en ĉi numero:* Andreo Andrio, René Ballaguy, Mark Eaton, Micheline Gallian, Louis Gohin, José Gram, Mirejo Grosjean, Klod, Laurent (Eo-grupo de Angers), Ĵak Le Puil, Vito Markovo, Vinko Markovo, Floréal Martorell, Line Morel, Jean Selle, Serg' Sir', Filipo Strido

**Kontribuaĵoj *Contributions***

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:
*Toujours bienvenues ! À faire parvenir au correspondant de rédaction :*

Serge Sire (Serĝo Sir')
85 impasse des Fées 74330 Sillingy
Reto : lasago@free.fr

Prefere per reto, tekstoj en RTF– aŭ TXT–formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, bildoj en TIFF–, JPEG– aŭ GIF–formo. Eventuale sur papero, tekstoj prefere tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.
Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

*De préférence par internet, textes en format RTF ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG ou GIF. Éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge). Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles. Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.*

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.**

**Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto.**

# En Manosko

Sabate la 2-an de junio 2012-a, je la 10-a, en la urbodomo de Manosko, okazis bonven-ceremonio honore al la ĵusgealvenintoj en Manosko.

Ni estis invititaj partopreni la ceremonion, same kiel la aliaj asocioj de la urbo. Antaŭe la organizantoj petis de ni 80 etajn dokumentojn rilate al niaj celoj por enmeti ilin en la inform-dosierojn distribuitajn al la genovuloj.

La urbestro kompendie paroladis pri Manoska historio kaj la urbfunkciado. Poste li nome prezentis al la publiko la ĉeestantajn asociojn.

Finfine li invitis ĉiujn partopreni la bonven-trinkadon.

Dume ni profitis por diskuti kun diversaj ĉeestantoj, inter alie AVF (*Accueil des villes françaises*) kies Brita prezidantino promesis organizi kun ni esperant-prelegon post la somerferioj, eble oktobre.

José Gram




# Esperanto-budo ĉe « Fête Bio » (apud Angers)

La 3-an de junio, la Esperanto-grupo de Angers partoprenis en ĉiujara eko-foiro (« Fête Bio ») en Mûrs-Érigné, apud Angers. Antaŭ kelkaj jaroj, vizitantoj miris pri ĉeesto de Esperanto-budo en tia foiro, nun ne plu: ili pli kaj pli konscias, ke ekzistas justa lingvo, same kiel ekzistas justa komerco.

Tiu budo estis plia okazo por subskribigi la peticion « Espéranto au Bac » (Esperanto ĉe la abiturienta ekzameno) kaj ankaŭ anonci la viziton de du Japanoj, Hori Yasuo et Arai Toshinobu, en septembro en Angers: ili parolos pri Fukuŝimo, temo pri kiu ekologiemuloj estas tre sentemaj.

Ankaŭ notindas, ke 2 tagojn antaŭe ni sendis mesaĝon al lokaj gazetoj kaj kontaktuloj, por simple anonci pri ĉeesto de Esperanto-budo ĉe la foiro: ĵurnalisto venis kaj redaktis bonan (t.e. preskaŭ seneraran!) artikolon. Ankaŭ simplaj reklamaj agetoj povas doni bonan rezulton!

Laurent
(por la Esperanto-grupo de Angers)

